

42a jaro. Nro 96<sup>a</sup>. 2a semestro 2015

# VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



**100-a Universala Kongreso  
de Esperanto en Lillo 2015!**



# Enhavtabelo

Noticias en español 3

La 100-a Universala Kongreso de Esperanto  
Raportas: Isaac Santiago 4

La 100-a Universala Kongreso de Esperanto  
Raportas: Liba Gabalda 8

Naciaj novaĵoj 10

Esperanto Fácil, nova kurso ĉe Youtube 11

Jara asembleo  
Ricardo Coutinho 11

T-ĉemizoj 12

Zamenhofa tago  
Ricardo Coutinho 13

Kampanjo #EsperantoLives  
Isaac Santiago 14

Polyglot Club - Mérida  
Isaac Santiago 15

Renkontiĝo en Merido  
Ricardo Coutinho 16

Labori por paco en malpaca mondo  
Mark Fettes 17

Directorio de Asociaciones en América 18

Esperanto: Movimiento internacional 19



Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.

Telefonnumero: 58-0212.662.9224

[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)

[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)



Venezuela Esperanto-Asocio membriĝis  
al UEA ekde 1978.

**Estraro:**

**Prezidanto**

Ricardo Coutinho.

**Vic-Prezidanto**

Juan Miranda.

**Ĝenerala Sekretario**

Elsa Angulo

**Kasistino**

Elizabeth Miranda.

**Aldelegito pri Publikigado**

Nancy Aquino

**Delegitoj regionaj**

Isaac Santiago (Merido)

Chistian Ponisio (Maturino)

**Grafikisto kaj kunredaktisto**

Isaac Santiago

**Ĉefredaktisto**

Ricardo Coutinho

## ¿Quieres saber más sobre el Esperanto?

El Esperanto es un idioma planificado, creado en 1887 para servir como idioma neutral internacional. Su gramática sencilla facilita su dominio rápido. Su flexibilidad lo convierte en una lengua ideal para la traducción y la creación literaria. Si quieres saber más sobre este idioma fascinante, escribe o dirígete a la **Asociación Venezolana de Esperanto**.

*Venezuela Stelo* es el órgano difusor oficial de la **Asociación Venezolana de Esperanto**. Esta revista está escrita en esperanto, conteniendo artículos de interés nacional e internacional.

Para saber más visita: [www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)

Y también el Directorio en las páginas 22 y 23 de este número.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



# 1er Congreso Venezolano de Esperanto

El 1er Congreso Venezolano de Esperanto se realizará en la ciudad de Mérida del 26 al 28 de agosto 2016. Se realizarán diversos eventos incluidos paseos al páramo merideño. Ya el evento tiene su página web, entra en el siguiente enlace para informarte mejor:

<http://esperantovenueza.weebly.com/esperanto-meacuterida-2016.html>



## Club Esperanto en Maturín

Desde el 4 de julio de este año, este grupo de interesados por el esperanto se reúnen frecuentemente para aprender el idioma esperanto y practicarlo. Tuvieron como instructor a Ramón Morales, actualmente es Miguel Lobatón. Interesados contactar a Anderson Da Silva al número telefónico 0416-0343954.



## Talleres:

Se realizaron talleres de Esperanto en los días 11 de octubre y 15 de noviembre del presente año. Asistieron personas de Barquisimeto, Miranda y Caracas.

El próximo taller se realizará el 31 de Enero 2016 en la sede de la AVE.

## Esperanto Fácil, nuevo curso en Youtube

Esperanto Fácil es un curso por youtube realizado por Isaac Santiago, el mismo es para hispanohablantes, aparece a partir del 19 de septiembre 2015, y para la fecha van 10 lecciones. Como dice su nombre, es una herramienta fácil de enseñanza de la lengua.

<https://www.youtube.com/watch?v=6WI42Tyvx8Q>

### Lección 3

#### 3.4 Preposiciones (I)

- Las preposiciones son palabras invariables que se utilizan para establecer una relación entre dos o más palabras.
- En la siguiente imagen podemos ver algunas preposiciones:



CURSO DE ESPERANTO, EL IDIOMA INTERNACIONAL

## Franelas de Esperanto ya disponibles

Finalmente aparecieron las franelas "Yo hablo el idioma internacional Esperanto" y "Esperanto Idioma Internacional para todos", ambos diseños fueron realizados por Ramón Morales Castel. Los mismos son adquiribles por medio de la asociación.



# La 100-a Universala Kongreso de Esperanto

Raportas: Isaac Santiago

Ekde la 25a de Julio ĝis la 1a de Aŭgusto 2015, okazis la 100a universala kongreso de Esperanto en la franca urbo Lillo. Ĝi estis elektita por omaĝi la 1an universalan kongreson de Esperanto en la najbara urbo Bulonjo-ĉe-maro en 1905.

Aliĝis 2.689 personoj de 81 landoj, rekorda kvanto da naciecoj en la tuta historio de universalaj kongresoj kaj denove kun la partopreno de Venezuelo, ĉifoje Isaac Santiago kaj lia edzino Andrea Araque el la urbo Mérida kaj ankaŭ Sandra Schenkel kiu naskiĝis en Venezuelo sed loĝas en Belgio.

La kongresa temo estis Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj.

El la ĉefaj eventoj okazis la kutimaj: Movada Foiro, Nacia Vespero, Kongresa Balo, Internacia Arta Vespero kaj MAS (malkovrita arta scenejo) kie dum la tagoj de la kongreso oni povis artprezenti diversmaniere. Ankaŭ okazis la jam kutima futbala matĉo, ĉi foje kontraŭ la selektiktaro de Okcidenta Saharo.

Dimanĉe la 26an de Julio, la esperanto-tago, okazis la solena inaŭguro, kion ĉeestis diversaj politikaj kaj urbaj aŭtoritatuloj. Prelegis la urbestro de Bulonjo ĉe maro Frédéric Cuvillier, Mark Fettes prezidano de UEA, Xavier Dewidehem prezidanto de LKK kaj ankaŭ la nepo kaj pranepino de L. L. Zamenhof, sinjoro Ludoviko-Kristoforo Zaleski-Zamenhof kaj Margaret Zaleski-Zamenhof. Ankaŭ salutis la reprezentantoj de la partoprenantaj landoj.





Merkrede la 29an de Julio, okazis solena ceremonio memore al la 1a UK en Bulonjo-ĉe-mar, kie okazis ankaŭ parado kaj flora oferdono en la Zamenhofa monumento. Dum la kongresa semajno flagris la esperanta flago super la belfrido de Bulonjo-ĉe-mar kiu ankaŭ estas monda heredaĵo de Unesko.

En la malkovrita arta scenejo (MAS) prezentis proksimume 20 artistoj de diversaj landoj, Andrea Araque reprezentantino de Venezuelo kaj ankaŭ de la arta grupo "Unción y Arte" prezentis la tradicion dancon de venezuelo "Joropo" laŭ la muziko de "Pajarillo". Nur 5 kandidatoj estis elektitaj por prezentiĝi en la Internacia Arta Vespero: Duopo Slezar (du fratoj denaskuloj el Hungario), Ralph Glomp (Germanio), Florante (virina triopo el Hungario), Tatiana (pianistino de nacieco franca kaj rusa) kaj Andrea Araque de Venezuelo!

Ĵaŭde la 30an de Julio okazis la dezirita futbala matĉo, kie en la unua duontempo la selektitaro de Okcidenta Saharo faris 4 golojn. La dua duontempo ne okazis, ĉar ambaŭ selektitaroj rimarkis ke dum la unua duontempo ili estis ŝtelitaj, tamen poste la urbestro de Lillo kaj la UEA redonis la monon al la ludantoj.

Post la futbala matĉo okazis la Internacia Arta Vespero, kie gajnis la Duopo Slezar, ili povos prezentiĝi en la venonta Internacia Arta Vespero en Nitra.

Sabate la 1an de Aŭgusto okazis la fermo de la kongreso, Xavier Dewidehem dankis al ĉiuj pro tia granda evento kaj transdonis la esperantan flagon al la prezidanto de LKK de la 101a UK Peter Baláž kiu post inviti partopreni al la venonta kongreso surprize faris edziĝpeton al lia amikino Dorota Rodzianko kiu respondis: kompreneble jes!

Poste dum la kantado de la espero ni adiaŭis la unuan ukan jarcenton de Esperanto kaj ĝoje atendas la venon de la sekvanta en Nitra-Slovakio.



Parado en Bulonjo-ĉe-mar, merkredon la 29an de Julio.



Zamenhofa monumento kaj belfrido en Bulonjo-ĉe-mar.



Fermo de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto.



Flagoj de Esperanto en la Kongresejo de la 100a UK.



Martin kaj la Talpoj, unu el kelkaj koncertoj dum la UK.



Andrea Araque kaj Isaac Santiago kun Margaret Zaleski-Zamenhof, pranepino de L. L. Zamenhof .



Ambaŭ kun Sandra Schenkel, de nacieco belga kaj venezuela.



Ambaŭ kun Xavier Dewidehem, prezidanto de LKK de la 100a UK.



Selektitaro de la futbala esperanta teamo.



Apogantaro de la futbala maĉo kontraŭ Okcidenta Saharo.



# La 100-a Universala Kongreso de Esperanto Isaac Santiago



Florante, triopo el hungario dum la Internacia Arta Vespero.



Andrea Araque enaltigis Venezuelon dum la 100a UK.



Duopo Slezar el hungario, gajnintoj de la konkurso.



Xavier Dewidehem dum la fermo de la 100a UK.



Subita edziĝpeto dum la fermo de la Universala Kongreso.



Transdono de la flago al la LKK de la 101a UK en Nitra.

# La 100-a Universala Kongreso de Esperanto

Raportas: Liba Gabalda

Cent dek jaroj pasis de post la unua Universala Kongreso okazinta en Bulonjo-ĉe-Mar. Ĉi-foje oni elektis kiel kongresurbon Lillo en nord-orienta parto de Francio. La kongreso okazis en moderna konstruaĵo Lille Grand Palais. Al ĝi enskribiĝis 2689 personoj el 81 landoj de kvin kontinentoj: rekorda nombro da partoprenantoj de UK-oj okazintaj en la 21a jarcento. Informoj pri la evento estis bone disvastigitaj. En la urbo aperis multaj afiŝoj pri la aranĝo kaj pri la publika programo, kiu okazis ĉiutage posttagmeze sur la placo de la Teatro. Prezentiĝis diversaj muzikgrupoj inter kiuj ne mankis JoMo, La Kompanoj, Kapriol, Kajto.

La temo de la kongreso estis: "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj". La programo estis varia kaj riĉa kun interesaj prelegoj, diskutoj, debatoj, E-kursoj kaj lingvokursoj, KER-ekzamenoj, filmoj, teatraĵoj, koncertoj, ekspozicioj, spektakloj kaj muzikaj prezentoj. Ĝi montris ampleksan kulturon kreitan de esperantistaro. Libroservo prezentis abundan kaj varian stokon da libroj, T-ĉemizojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis multnombraj eroj kaj aktivaĵoj. Kunvenis akademianoj, medicinistoj, fervojistoj, ateistoj, spiritistoj, bahaanoj, komunistoj, juristoj, blinduloj, skoltoj, vegetaranoj, komercistoj, matematikistoj, radioamatoroj, nefumantoj, kat-amantoj, SAT-anoj, legantoj de la revuo "Esperanto". Plurfoje estis pritraktita la kongresa temo, okazis IKU-prelegoj kaj serio da prelegoj pri Francio, vinseminario, oratora konkurso. Formiĝis internacia koruso sub gvido de Alan Bishop el Aŭstralio.

La poresperanta programo komenciĝis per Movada Foiro. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj aranĝoj dum la UK-oj. Tie sur 120 tabletoj diversaj asocioj prezentis allogan E-materialon kaj informis pri sia agado. Ĝi estas granda renkontiĝejo kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Dimanĉe okazis la Solena malfermo de la kongreso. Unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj ĝi estis rekte elsendita per interreto. Esperantistoj el pluraj partoj de la mondo povis sekvi ĝin. Kortuŝa estis la salutparolado de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof, la nepo de la Majstro. La solenaĵon ĉeestis kaj alparolis la publikon ankaŭ la alta protektanto de la 100-a UK, la urbestro de Bulonjo-ĉe-Mar s-ro Frédéric Cuvillier.

La kongresa kuriero Belfrido ĉiutage informis pri novaĵoj, ŝanĝoj kaj aldonis liston de novaj kongresantoj. Ankaŭ la loka gazeto La Voix du Nord (La Norda Voĉo) ĉiutage informis pri kongresaj eventoj. Ne mankis intervjuoj kaj televid-elsendoj.

Veronika Poór estis elektita Ĝenerala Direktoro de UEA. Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio. Dekdu esperantistoj ricevis diplomon pri elstara agado kaj pri elstara arta agado. Okazis belartaj konkursoj kaj la tradicia aŭkcio, unu el la viglaj kaj ŝatataj programeroj (spektaklo), kiun majstre gvidas jam de kelkaj jaroj Humphrey Tonkin. Koreoj invitis kongresi en la jaro 2017 en Seulo, slovakoj - venontjare en Nitro. Junuloj havis abundajn kaj buntajn programerojn kaj amike amuziĝis. Infanoj ĝuis sian kongreseton. Same kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje okazis futbalmatĉo. Nia teamo konsistanta el entuziasmuloj tamen perdis 4-0 kontraŭ skipo de Okcidenta Saharo.

La kongresanoj havis eblon partopreni en diversaj ekskursoj biciklaj kaj busaj al Parizo, Amieno, Arraso, Bruĝo kaj al aliaj lokoj. La plej alloga estis tiu al Bulonjo-ĉe-Mar. Tie oni vizitis la teatron Monsigny, kie okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1905. La prezidanto de UEA Mark Fettes citis la tiaman paroladon de Ludoviko Zamenhof. Centoj da esperantistoj paradis tra la stratoj kun afiŝoj kaj flagoj al la monumento de Zamenhof antaŭ la stacidomo kaj poste al la urbodoma akcepto. Tie post la paroladoj la esperantistaro estis regalita per vino, biero, diversaj suktoj kaj manĝaĵetoj. Vespere Guillaume (Guijom') Armide, la franca talenta muzikartisto preleg-koncertis en la bulonja teatro por la ĝenerala publiko, sed bedaŭrinde venis tre malmultaj personoj.

La 1-a de aŭgusto la jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto finiĝis. Dum la tuta semajno akompanis nin la giganto Zamenhof. Oni resumis la semajnan aranĝon, disdonis diplomojn pro la kvadekjara kaj kvindekjara membreco al UEA. Antaŭ la fino prezentiĝis sur la podio infanoj el Infana Kongreseto kaj kantis por la publiko. Gijom' Armide pianludis. Al Ĝenerala Direktoro Osmo Buler estis transdonitaj donacoj pro lia venontjara emeritiĝo. Clay Magalhães dankis kaj disdonis rozojn al ĉiuj LKK-anoj kaj al la helpantoj. Post la transdono de la verda standardo al la reprezentantoj de la LKK en Slovakio Petro Baláž kaj la urbestro de Nitro sincere invitis la ĉeestantaron al la 101-a UK, okazonta tie venontjare. Laste kaj neatendite por ĉiuj Petro Baláž petis edziĝon al sia pola koramikino Doročka Rodzianko antaŭ kelkcentoj da spektantoj kaj donacis al ŝi fianĉrington. Fine estis kantata la Esperanto-himno La Espero.

Liba Gabalda







**ÈVÈNEMENT**  
**Mondial d'esperanto.** Jusqu'à demain. Un programme composé de cours express, d'expositions, de concerts, d'animations musicales...  
 Aujourd'hui :  
 - Atelier de chant en esperanto avec le duo Kajto. À 10 h, place du Théâtre, Lille. Gratuit.  
 - Match international de football (Esperanto/Sahara occidental). À 18 h, Stadium Lille métropole, avenue de la Châtellenie, Villeneuve-d'Ascq. Gratuit.



**100<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto**  
 Lillo, 25 julio-1 aŭgusto 2015

**BONVENON**  
 Esperanto, giganta paŝo por la homaro  
 Esperanto, un pas de géant pour l'humanité



**KORAJN KONGRESAJN  
 SALUTOJN**



25 juliet - 1<sup>o</sup> août 2015

**MONDIAL D'ESPÉRANTO**

la langue internationale équitable !  
 la internacia lingvo justa !

**Ĝis revido en Nitra!**  
**Ĝis revido en UK 2016!**



## Naciaj novaĵoj

**Landa kongreso:** nia landa asocio faros en la urbo Merido la 1an Venezuelan Kongreson de Esperanto, ĝi okazos je la 26a ĝis la 28a de aŭgusto 2016. Ni jam havas blogon pri tiu evento:

<http://esperantovenueza.weebly.com/1a-vek-2016.html>

**Esperanto-Klubo de Maturino:** aperis ekde la 4a de julio, tiu grupo de interesintoj de esperanto kaj ofte rekontiĝas. Ramón Morales instruis tie, nuntempe estas Miguel Lobatón.

**Atelieroj pri Esperanto:** je la 11a de oktobro 2015 kaj 15a de novembro 2015. En la unua partoprenis personoj de Barkisimeto, Mirando kaj Karakaso. En la dua partoprenis personoj de Mirando kaj Karakaso.

### Novaj membroj de nia asocio:

Katerina Gómez, instruistino pri elektronika inĝenierado en la Universitato Simón Bolívar, en Baruto, Karakaso.

Elsa Angulo, lernis merkatostudon kaj laboras kiel gvidantino de telefonservoj, laboris en diversaj kompanjoj kiel LG, Banco de Venezuela, CANTV, inter aliaj. Nuntempe estas sekretario de nia asocio.

Isaac Santiago, Aŭditoro, laboras en la Ŝtata Impostoinstituto (SENIAT), loĝas en la urbo Merido, estas ĉefdelegito pri la 1<sup>a</sup> Kongreso Venezuela de Esperanto, tre aktiva en tiu urbo, kreinto de la kurso de Esperanto en youtube (Esperanto FÁCIL).

Christian Ponisio, inĝeniero pri petrolo, loĝas en Maturino (ĉefurbo de la ŝtato Monagas), antaŭ kelkaj monatoj ekkomencis lerni esperanton.

### Demisioj:

Thairon Martínez (Spirajn Senpretend), li estis sekretario de nia asocio. Dum preskaŭ du jaroj laboris multe en laborado de interna regulado kaj reformigo de la statusoj. En la asocio faris novan sekcion nomumita Sona Sewi, filozofia teamo kune kun du kunlaborantinoj, la unua tasko de tiu grupo estis serĉi inter la filozofiaj skoloj elementojn kiuj povus esti uzataj por ŝanĝi la movadon, ĉar laŭ ĝia vidpunkto la esperantista komunumo perdis sian vojon. Unue ili uzis la pensmanieron de Zamenhof verkita en la homaranismo kaj post iam tiu teamo uzis aliajn aŭtorojn.

Ramón Morales, li estis la grafikisto de Venezuela Stelo dum la jaro 2009 ĝis 2015, li ne plu aperis en sia kurso en la urbo de Maturino, li ĉesigis sian amikecon en la retaj socioj al asocioj kaj amikoj de nia asocio, li ne informis pri sia demisio, nur li ne plu repondis mensaĝojn.



Esperanto-Klubo de Maturino.



Ateliero de la 11a de oktobro.



## Esperanto FÁCIL, nova kurso ĉe Youtube

La 19an de Septembro 2015, aperis la kurso "Esperanto FÁCIL" ĉe Youtube, farita de Isaac Santiago. Post kvar monatoj jam estas alŝutitaj la unuaj 10 lecionoj kaj mankas proksimume aliaj 5 lecionoj. Ekde la sesa, ĉiu leciono havas specialan invititon, ĝis nun partoprenis Soraya Álvarez de Argentino, Flama Floro de Vjetnamio, Olga Shiliaeva de Rusio, Pradip Guimire de Nepalo kaj Namir Rodríguez de Dominika Respubliko. Jezer Dorante de Venezuelo ankaŭ helpis per la plibonigado de la sono.

Tiu ĉi kurso distingiĝas ĉar ĝi komenciĝas ekde la parto plej simila al la hispana kaj pro tio en la unuaj lecionoj oni ne bezonas lerni pri fonetiko aŭ ortografio. Krome en ĉi tiu kurso, kontraste kun multaj aliaj esperantaj kursoj, ne komenciĝas de la instruado de la tutan fonetikon en la unua leciono, fakte en la unuaj 10 lecionoj, restas ankoraŭ instrui tri fonemojn (ĥ, ĵ kaj z).

Ankaŭ la kurso havas la avantaĝon ke ĉio estas klarigita per aŭdo, kontraste kun multaj aliaj kursoj kiuj nur havas aŭdon en la esperanta parto.



### CURSO DEL IDIOMA INTERNACIONAL

Dum kvar monatoj la videoj jam havas pli ol 2000 vizitojn de 43 landoj, la landoj kiuj havas pli da vizitoj estas Argentino, Meksiko, Venezuelo, Hispanio kaj Kolombio.

La ligilo de la unua leciono estas:

<https://www.youtube.com/watch?v=6WI42Tyvx8Q>



## Jara asembleo Ricardo Coutinho

Je la 29a de novembro okazis la jara asembleo. La elirinta estraro prezentis la agadraporton kaj bilancon, la rezulto de la balotado por la nova estraro estis: Ricardo Coutinho (prezidanto), Juan Miranda (vicprezidanto), Elizabeth Miranda (kasistino), Elsa Angulo (sekretariino), Nancy Aquino (delegito pri publikigado). Krom la Asembleo decidis ke la jaro kotizo estus 1400 bolivaroj po monato ĝis junio, en junio oni decidis en estrarkunveno ĉu oni plialtigu aŭ malplialtigu la kotizon kaj prezento de bilancoraporto.





# T-ĉemizoj

Finfine aperis la t-ĉemizoj "yo hablo el idioma internacional esperanto" kaj "Esperanto Idioma Internacional para todos", ambaŭ logoj estis faritaj de Ramón Morales Castel. Ili estas aĉeteblij pere de la asocio.

Finalmente aparecieron las franelas "Yo hablo el idioma internacional Esperanto" y "Esperanto Idioma Internacional para todos", ambos diseños fueron realizados por Ramón Morales Castel. Los mismos son adquiribles por medio de la asociación.



**Costos de las franelas:** 1 por 2.000 bolívares, 3 en adelante 1.800 cada una y si es asociado el precio es 1.600. Tallas: S, M, L, XL. Hay en cuello V y cuello redondo.



**ESPERANTO**  
*Idioma Internacional para todos!*

*Yo hablo el Idioma Internacional Esperanto!*



**ESPERANTO**  
*idioma neutral para todos!*

*Yo hablo el Idioma Internacional Esperanto!*



## Zamenhofa tago Ricardo Coutinho

Je la 13a de decembro 2015, la Venezuela Esperanto-Asocio faris en sia oficejo la tradicion Zamenhofan Tagon, por festi la naskiĝtagon de L. L. Zamenhof, la vera dato estas la 15a de decembro, sed pro teknikaj kialoj oni sugestis fari ĝin tiu dimanĉo.

En la kunveno; ni aŭdis muzikon, manĝetis, babilis kaj interŝantiĝis donacojn kun kelkaj asocioj kaj amikoj.

El 13 de diciembre de 2015, la Asociación Venezolana de Esperanto organizó en su sede el tradicional Día de Zamenhof, con el fin de festejar el nacimiento de L. L. Zamenhof, la verdadera fecha de nacimiento es el 15 de diciembre, pero por razones técnicas se convino hacer en ese día domingo.

En esta actividad; escuchamos música en esperanto, charlamos e hicimos un intercambio de regalos con varios miembros y amigos de la asociación.





# Kampanjo #EsperantoLives

Isaac Santiago

En la sociaj retoj oni uzas la simbolon krado (#) por etiketi iun publikigaĵon, kaj kiam oni alklakas ĝin tuj povas vidi aliajn publikigaĵon kun la sama etiketo.




Por festi la zamenhofan tagon 2015, aperis kampanjo kun la celo diskonigi esperanton. Tiu propono estis publikigita fine de Oktobro ĉe Youtube en la kanalo Evildea de Richard Delamore, esperantisto de Aŭstralio. La propono estas ke multaj esperantistoj faru propran videon pri esperanto kaj alŝuti ĝin en Youtube la 15an de Decembro 2015 kun la etiketo #EsperantoLives (Esperanto vivas) en la angla por ke tiamaniere kiuj ne scias pri esperanto povu interesiĝi kaj rigardi la publikigaĵojn.

En la videoj ĉiu devis paroli en sia gepatra lingvo kaj respondi demandojn kiel: kio estas esperanto?, kial li/ŝi lernis ĝin? Kaj kiel li/ŝi uzas ĝin kutime?.

Richard Delamore, ankaŭ promesis fari defion proponita de liaj sekvantoj ĉe Youtube, tio por voligi ilin fari videon. La defion proponita estis manĝi araneon, kaj li farus tion se dum la mateno de la 15 de Decembro, jam estus pli ol 30 videoj kun la etiketo. Tamen dum la mateno de la 15a de Decembro jam estis pli ol 60 videoj ĉe Youtube kun la etiketo #EsperantoLives. Multaj homoj de diversaj landoj kaj aĝoj alŝutis videon por la kampanjo, ankaŭ Venezuelo. Poste, la 16a de Decembro, Richard Delamore faris videan kolaĝon de pli ol 80 videoj. Tiu ĉi estas la ligilo:

<https://www.youtube.com/watch?v=jHabowbVGPO>

Poste li publikigis videon farante sian defion, li kutime faras defiojn por diskonigi sian kanalon ĉe Youtube.





# Polyglot Club-Mérida

Isaac Santiago

Ekde Novembro 2014 aperis la grupo de Facebook, Polyglot Club Mérida. La grupo estis kreita por renkontiĝi kun personoj de la urbo por praktiki diversajn lingvojn, normale la anglan kaj la francan. Ankaŭ en tiuj renkontiĝoj oni parolas pri spertoj en la uzado aŭ lernado de la lingvoj.

En la renkontiĝoj partoprenas inter 6 kaj 10 personoj. Ankaŭ partoprenis fremdaj turistoj de Italio, Pollando kaj Francio.

Post unu jaro da renkontiĝoj jam okazis 15 el tiuj kaj ankaŭ en Maracaibo aperis propran grupon de Polyglot kaj okazis la unua renkontiĝo.

La renkontiĝoj okazas kutime en kafejo de la urbo, kaj afiŝon kun la bildo de la grupo oni videbligas, ĉi tio por faciligi trovi la renkontiĝon por la komencantoj.

Ekde la 10a la renkontiĝoj havas ankaŭ bazan kurson de iu lingvo, unue oni instruis la portugalan kaj poste la germanan.

La tria lingva kurso estis de Esperanto, tio okazis sabate la 19 de Decembro 2015. En tiu kurso partoprenis 6 personoj, ili estis: Alejandro Moreno, Yosua Llanos, Lorena Salazar, Andrea Araque, Jossué Belandria kaj Daniel Odreman. La kurso temis pri respondi la demando: kial esperanto estas facila?. Post instrui kelkajn regulojn kaj vortojn, la partoprenantoj povis diveni kelkajn vortojn en Esperanto nur konante la radikon kaj la finaĵojn.



## ENCUENTRO POLYGLOT CLUB Mérida - Venezuela!

Sábado 19/12/2015  
4:00pm

Constantinos Café, C.C Las Tapias, PB.  
Av. Andrés Bello.

Free! Juegos


Idiomas diversos

¡Clase de Esperanto básica!  
Esperanto Basics

practica de idiomas

The Esperanto Teacher

[www.facebook.com/groups/PolyglotClubMeridaVenezuela](http://www.facebook.com/groups/PolyglotClubMeridaVenezuela)  
WhatsApp: + 58 426 536 15 85.





# Renkontiĝo en Merido Ricardo Coutinho

En la pasinta decembro la vicprezidanto (Juan Miranda) kaj la kasistino (Elizabeth Miranda) de Venezuela Esperanto-Asocio rekontiĝis kun Reni Molina, esperantisto en Tovar (Ŝtato Merido) kaj la geedzoj Andrea kaj Isaac Santiago en Merido (ĉefurbo de la ŝtato Merido), tiuj rekontiĝoj, por organizi kelkajn aspektojn de la 1a Venezuela Kongreso de Esperanto.

En el pasado diciembre, Juan Miranda y Elizabeth Miranda, vicepresidente y tesorera respetivamente de nuestra asociación se reunieron con Reni Molina en la ciudad de Tovar, estado Mérida y con los miembros locales Andrea Araque e Isaac Santiago en la ciudad de Mérida, con el fin de afinar algunos aspectos del 1er Congreso Venezolano de Esperanto.







## Labori por paco en malpaca mondo Mark Fettes

La pasintan jaron ombris militoj kaj atencoj. Sirio, Irako, Jemeno; Sud-Sudano, Niĝerio, Centrafrika Respubliko; Mjanmao, Pakistano, Afganio; Ukrainio, Meksiko, Kolombio... en ĉiuj kontinentoj, miloj da homoj mortis perforte, per bomboj kaj pafiloj, en daŭrantaj konfliktoj diversspecaj. Teror-atakoj amase mortigis civitanojn en Ankaro, Garisso, Bejruto, Parizo, Tunizo, San-Bernadino. Pri kelkaj el tiuj tragedioj oni vaste raportis; pri aliaj nur malmulte. Sed pri rapidaj kaj facilaj solvoj oni ne povas paroli, ĉar temas pri fruktoj de longa malpaca historio.

Tiu malpaca historio estas la fono, sur kiu aperis kaj disvolviĝis nia movado por lingvo neŭtrale homa. Ni ĉiuj konas la alvokojn de Zamenhof, ke **ni, pacaj batalantoj, laboru por starigi unu grandan rondon familian en kiu ĉiuj homoj kaj popoloj povus senti sin sekuraj kaj juste traktataj.** Sed ni ne forgesu, ke li faris tiujn alvokojn fronte al kruelaĵoj, kiuj hante similas tiujn de la nuna mondo. Jam en la dua Universala Kongreso en Ĝenevo, 1906, li elvokis la eventojn en sia ruslanda patrujo:

Terura estas la stato de aferoj en la multlingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bielostok, rigardadis kun doloro la reciprokajn fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon: en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielostoka buĉado; al vi kiel al Esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.

Kompreneble Zamenhof ne povis antaŭvidi, kiom pli teruraj kaj amasaj estos la suferoj de viktimoj en la unua kaj dua mondmilitoj, kiam pereos i.a. liaj propraj familianoj. Sed li jam komprenis, kiel li diris la postan jaron en la londona Gildhalo, ke longe dauros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, antaŭ ol la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj.

Kiel ni esperantistoj kondutu, fronte al tiuj realaĵoj? **Evidente ni ne estas imunaj kontraŭ antaŭjuĝoj kaj misperceptoj pri niaj kunhomoj; ĉiu el ni dividas, certgrade, la valorojn kaj vidpunktojn de siaj etno, socia klaso, amaskomunikila medio kaj**

**simile.** Iĝante esperantisto, oni ne demetas siajn aliajn identecojn. Tiel eblas, ke esperantistoj tiriĝas al malsamaj flankoj en diversaj konfliktoj, aŭ pli spontane sentas solidarecon kun iuj viktimoj ol kun aliaj. **Tiel eblas, ke ankaŭ en Esperanto foje aperas esprimoj de maltoleremo, malrespekto, eĉ malamo.**

Lerni Esperanton estas efektive nur unu paŝo sur longa, preskaŭ senfina vojo al homaraneco. La lingvo donas al ni multon: esprimilon, komunikilon, kulturbazon, tradiciaron; unuvorte, komunumon. Sed, por citi Zamenhof denove: Ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn. **Nia komunumo estas lernejo, en kiu la lernantoj estas samtempe la instruistoj,** en kiu la studfakoj kovras la tutan vivon de la homaro, en kiu la fina diplomo neniam estas atingita. Esperanto provizas fundamenton, konstrumaterialojn; ni faras la ceteron mem, laŭ niaj povoj.

Tiuj povoj ankoraŭ ne etendiĝas al la ĉesigo de militoj, kiel revis Zamenhof. Ni dividas la timojn kaj la sentojn de la ordinaraj homoj, kiujn trafas la minaco de bomboj kaj kugloj. En niaj diversaj hejmlukoj, ni venas al diversaj starpunktoj pri la politikaj kaj sociaj demandoj, kiuj naskas teroron kaj militon. **Sed kiel esperantistoj, ni povas strebi al solidareco, al reciproka kompreno, al kunlaboro kaj kunlernado nelimitaj de haŭtkoloro, kredo, kulturo. Al la detruado ni povas kontraŭmeti konstruadon; al la klopodoj disigi kaj marĝenigi homojn ni povas respondi per malfermitaj brakoj kaj pordoj.**

Kiel fari tion pli efike, pli konsekvence, pli bone – jen grava demando por la 101-a Universala Kongreso en Nitro. Sub la temo Socia justeco — lingva justeco ni havos okazon reipensi la laboron de la esperantistoj por pli paca mondo. Ni ja ne estas solaj en tiu laboro; amaso da movadoj, multe pli ol en la tempo de Zamenhof, dividas niajn valorojn kaj niajn celojn, se ne ankoraŭ nian lingvon. **Malfermante nian modestan memlernejon al iliaj ideoj kaj atingoj, enplektante ilin en niajn diskutojn kaj planojn, ni samtempe plifirmigos nian pozicion en la tuthomara strebado por paco kaj justeco.**

Mi deziras al ĉiuj esperantistoj pacan kaj solidarecan jaron 2016!

Mark Fettes



# Directorio de Asociaciones en América

El Movimiento Esperantista (la *Movado*) es muy amplio y diverso. En todo el mundo hay una variedad de clubes, organizaciones, asociaciones, editoriales, institutos, etc, dedicados a la difusión y el uso del idioma internacional Esperanto. En este directorio te mostramos las páginas oficiales de las principales asociaciones de Esperanto en América. Presta especial atención a las páginas y recursos de asociaciones en países de habla hispana, puesto que podrás aprovechar tu lengua materna (el español), para aprender Esperanto o para participar en los eventos y encuentros en todo el continente.

## CANADÁ

Esperanto en Canadá: <http://www.esperanto.ca/>

*Esperanto-Societo Kebekia*: <http://www.esperanto.qc.ca/eo>

Boletín *La Riverego*: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego>

## ESTADOS UNIDOS DE NORTEAMÉRICA

Esperanto-USA: <http://www.esperanto-usa.org/>

*Usona Esperantisto*, boletín de Esperanto-USA:

<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

Sociedad Esperantista de Washington: <http://www.esperantodc.net/>

Sociedad Esperantista de New York: <http://www.esperanto-nyc.org/>

*Esperantic Studies Foundation*: <http://esperantic.org/en/>

Editorial *Mondial*: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

## CUBA

Asociación Cubana de Esperanto: <http://www.esperanto.cult.cu/>

*Radio Havano Kubo*: <http://www.radiohc.cu/eo/>

## MÉXICO

Federación Mexicana de Esperanto:

<http://esperanto-mexico.org/>

Revista *Ni ĉiuj*:

<http://esperanto-mexico.org/es/nicxiuj>

Asociación Mexicana de Esperanto:

[http://meksikoesperanto.org/el\\_esperanto\\_en\\_mexico.htm](http://meksikoesperanto.org/el_esperanto_en_mexico.htm)

## COLOMBIA

Liga Colombiana de Esperanto:

<http://www.oocities.org/kolombio/>

*Kolombia Esperanto-Ligo*:

<http://esperantokalio.blogspot.com/>

## VENEZUELA

Asociación Venezolana de Esperanto:

<http://www.esperanto-venezuela.org>

## BRASIL

*Brazila Esperanto-Ligo*: <http://esperanto.org.br/bel/>

*Brazila Esperantista Junulara Organizo*: <http://bejo.esperanto.org.br/>

*Esperanto @ Brazilo* (portugués): <http://esperanto.brazilo.org/wp2/>

*Esperanto Ilustrado* (portugués) :

<http://www.esperantoilustrado.blogspot.com.br/>

*Esperanto Ilustrita* (esperanto):

<http://www.esperantoilustrita.blogspot.com.br/>

*Kultura Kooperativo de Esperantistoj*: <http://www.kke.org.br/>

*Esperanto-Asocio de San-Paŭlo*: <http://easp.org.br/portal/>

## URUGUAY

*Urugvaja Esperanto-Societo*: <http://www.esperanto.org.uy/>

## CHILE

Asociación Chilena de Esperanto:

<http://esperanto.cl/>

Juventud Esperantista Chilena:

<http://chejo.blogspot.com>

## ARGENTINA

Liga Argentina de Esperanto: <http://www.esperanto.org.ar/>

Blog de la Liga: <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/>

*Bonaera Esperanto-Asocio*: <http://esperanto-bea.blogspot.com/>



# Esperanto: Movimiento Internacional

El Movimiento Esperantista es un movimiento verdaderamente internacional, multicultural, que reúne en un solo esfuerzo muchas culturas, pueblos y naciones, sin discriminación de razas, idiomas, religiones o inclinaciones políticas. Esperanto significa idioma pero también significa cultura internacional, derechos humanos, democracia y justicia social. Todas las asociaciones y hablantes del idioma internacional tienen un centro común, la Asociación Universal de Esperanto, que organiza, entre otras cosas, los Congresos Universales de Esperanto que se llevan a cabo en una ciudad del mundo una vez cada año.

## ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE ESPERANTO y otras organizaciones esperantistas

Asociación Universal de Esperanto (UEA):  
<http://www.uea.org/info/hispana.htm>

UEA en Facebook:  
<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Centro multilingüe sobre el Esperanto: <http://esperanto.net/>

Unión Europea de Esperanto: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Liga Internacional de Pedagogos Esperantistas:  
<http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=6565769>

edukado.net: <http://edukado.net/>

Academia Internacional de las Ciencias San Marino:  
<http://www.ais-sanmarino.org/index.htm>

Asociación Mundial Anacional: <http://www.satesperanto.org/>

Academia de Esperanto: <http://www.akademio-de-esperanto.org>

## Periódicos y revistas en línea

Revista Kontakto (revista juvenil): <http://kontakto.tejo.org/>

Eŭropa Bulteno (Boletín de Eŭropa Esperanto-Unio):  
<http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/>

La Ondo de Esperanto y editorial Sezonoj: <http://esperanto.org/Ondo/>

La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Le Monde diplomatique: <http://eo.mondediplo.com/>

La Esperanto-centro EVENTOJ: <http://www.eventoj.hu/>

La Esperanta Gazetejo: <http://www.gazetejo.org/gazetejo>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/>

El Popola Ĉinio (Desde la China del Pueblo):  
<http://esperanto.china.org.cn/EL/EL/EIPopolaCxinio/>

Monato (actualidad, noticias y opinión): <http://monato.esperanto.be/>

Usona Esperantisto (Esperantista estadounidense):  
<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

## En España

Federación Española de Esperanto:  
<http://www.esperanto.es/hef/>

Hispana Esperantista Junulara Societo:  
<http://www.esperanto.es/hef/index.php/hejs>

Asociación Catalana de Esperanto:  
<http://www.esperanto.cat/web/?lang=ca>

Kataluna Esperanto-Junularo:  
<http://esperanto.cat/kej/ca>

Kataluna Esperantisto (revista):  
<http://www.esperanto.cat/web/KatalunaEsperantisto?lang=ca>

Arunda Esperanto-klubo:  
<http://esperantoarunda.blogspot.com/p/eventos-eventoj.html>

Asociación Andaluza de Esperanto:  
<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

## Radios y podcasts

Radio Vatikana (Ciudad Vaticano):  
<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>

Radio Havano Kubo (Cuba): <http://www.radiohc.cu/eo/>

Muzaiko (Internacional): <http://muzaiko.info/>

Pola retransmisión (Polonia): <http://pola-retransmisión.org/>

Kern.punkto (Alemania): <http://kern.punkto.info/>

Peranto (Alemania): <http://members.aon.at/aldone/retransmisión/>

3ZZZ Radio en Esperanto (Australia):  
<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Varsovia Vento (Polonia): <http://www.podkasto.net/>

## Editoriales

Eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com/>

Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

Flandra Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.be/fel/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Eldona Esperanto-Societo: <http://www.algonet.se/~eldona/>

KAVA-PECH: <http://www.kava-pech.cz/index-esperanto.html>

Libros de la serie Stafeto de Juan Régulo Pérez:  
<http://www.esperanto.be/fel/but/stafeto.php>

# Partoprenu la 1an VKE!

## Malkovru la andojn!

### Ĝeneralaj informoj pri Venezuelo kaj Merido

#### Situo

Venezuelo situas norde de Sudameriko, ĝia kontinenta areo ampleksas 916.445 km<sup>2</sup>. Ĝi limas 3 landojn: Kolombio, Brazilo kaj Gujano.

Merido situas en la sudokcidenta parto de la lando, je la fino de la Anda Kordilero inter la plej altaj montoj de la lando. La plej alta monto estas La Bolivara Montopinto (4890 metroj), videblas el la urbo kaj estas kovrita de neĝo la tutan jaron.

#### Loĝantaro

Venezuelo havas proksimume 27 227 930 loĝantojn. Ĉirkaŭ 12% el ili, vivas en la ĉefurbo. Merido havas ĉirkaŭ 330 287 loĝantoj.

#### Vetero kaj klimato

En Aŭgusto la temperaturo en Merido povas varii inter 22° C kaj 31° C, kaj foje pluvas.

#### Lingvoj

La hispana estas la oficiala lingvo en la tuta lando, en Merido eblas trovi anglaparolantojn en hoteloj kaj la flughaveno.

#### Mono

La oficiala mono estas Bolivaroj (Bs.). En Venezuelo Dolaro kaj Eŭro tre alte valoras, pro tio vi povas ŝpari sufiĉan monon.

<http://esperantovenezuela.weebly.com/1a-vek-2016.html>



VENEZUELA STELO  
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.  
Telefonnumero: 58 0212 6629224.  
[www.esperanto-venezuela.org](http://www.esperanto-venezuela.org)  
[venesperanto@cantv.net](mailto:venesperanto@cantv.net)



Revista oficial de la Asociación Venezolana de Esperanto.